# ESPERANTA FINNLANDO

N:o 1 Marto 1951

Oficiala organo de Esperanto-Instituto de Finnlando. Administracio: Eldono Vilho Setälä. — Redaktoro: magistro Vilho Setälä. Adreso: Onnentie 23, Taivaskallio, Helsinki, Finnlando. Tel. 791 556. Konto (postisiirtotili) 6117. — Abonprezo en Finnlando 200 mk, al eksterlando 260 mk aŭ 13 respondkuponoj. aŭ 1,00 usona dolaro. Pagu al via esperanta librejo aŭ al administracio de vialanda esperanta gazeto. — Tilaushinta Suomessa 200 mk, ulkomaille 260 mk.

**SUOMEN ESPERANTISTIEN ensimmäinen sodanjälkeinen yleinen kongressi**

Helsingissä 27 pnä maaliskuuta 1951

Asematalon kerhohuoneessa:

klo 9 Universala Esperanto-Asocion suom. jäsenten kokous
klo 11 Suomen Rautatieläisten Esperantoyhdistyksen vuosikokous
klo 13 Suomen Esperantoliiton vuosikokous
klo 14.30 Suomen opettajain Esperantoliiton vuosikokous
klo 16 Suomen Esperanto-opiston kannatusyhdistyksen vuosikokous
klo 19.30 Suomen esperantistien yhteinen illanvietto, isäntinä Rautatieläisten Esperantoyhdistys.

Kaikkia kansainvälisen kielen aatteen kannattajia kehotetaan osallistumaan näihin kokouksiin. Nykyisenä aikana, jolloin kansojen väliset suhteet uhkaavat kärjistyä, kootkaamme kaikki yhteiseen, ylevämpään ihmisyyteen tähtäävät voimat aktiiviseen toimintaan hengen ja kulttuurin tuhoa torjumaan.

**ESPERANTO-ASOCIO DE FINNLANDO**

Esperanto-Asocio de Finnlando estas vokita al jarkunveno la 27:an de marto je la 13a horo en la kunvenejo de Fervoja stacio.

Esperanta movado antaŭenmarŝas en la mondo. Tion ni ĉiuj bone scias, kiuj legas iun el la bonaj kaj viglaj gazetoj, kiuj aperas en Esperantujo, kaj donas ankaŭ al ni finnaj esperantistoj nian "spiritan nutraĵon". Sed io mankas. Ni estas tro modestaj, ĉar ni tute ne pensas pri nia propra movado, ni ne cerbumas, ĉu ni havas esperantan movadon aŭ ne, sed konsideras la staton tute natura. Kaj tiam la aferoj ne iras sur la ĝustaj reloj, ili tute ne marŝas, nia movado preskaŭ ne ekzistas.

En la sama tago kolektiĝas ankaŭ la aliaj esperantaj organizaĵoj de nia lando. Ĉiuj iliaj partoprenantoj, ĉiuj esperantistoj de Finnlando estas bonvenaj partopreni en la kunveno de EAF. Tie ni ne parolos nur pri la agado de nia asocio kaj ĝia refortigo, sed pri la tuta movado. Venu diskuti kun ni! Ne demandu pri la membreco en unu aŭ alia societo.

Antaŭ ni staras multaj taskoj. Ni devas vigligi nian movadon, ni devas fortigi kaj certigi la ekziston de nia propra organo "Esperanta Finnlando". Sen la organo la kontakto inter la esperantistoj estas malforta. Ni devas trovi solvon por garantii la konstantan aperadon, kaj pri tio devas diskuti kiel eble plej multaj el niaj samideanoj, por ke povu varbi al ĝi multajn abonantojn kaj multajn membrojn al nia Asocio. Mankas multo al nia movado, sed ne atendu, ke aliaj forigos la man-

## ESPERANTO INTER FINNLANDAJ FERVOJISTOJ

La 26:an de junio 1949 kolektiĝis en Helsinki reprezentantoj de diversaj fervojistaj rondoj por interkonsiliĝo, en kiu oni decidis fondi esperantan studrondon kaj elektis provizoran komitaton. La 26:an de septembro samjare la studrondo fondiĝis kun la nomo Esperanta Studrondo de la Ligo de Finnlandaj Fervojistoj, kaj al ĝi aliĝis preskaŭ 50 membroj. La studado progresis bone, kun granda vigleco, sub la gvidado de instruisto Hannes Koivu. La rondo havis ankaŭ alian viglan agadon.

Inter la Finnlandaj fervojistoj ja okazis esperanta agado jam de la jaro 1922, kun la pionira gvidado de ekstaciestro Hugo Salokannel.

La 26:an de marto en 1950 kolektiĝis malnovaj fervojistaj esperantistoj sub la prezido de H. Salokannel en Helsinki, kaj tie estis decidata la fondo de oficiala fervoja esperanto-organizaĵo. Kunvokitaj de prepara komitato la interesatoj fondis la 24:an de septembro 1950 organizaĵon kun la nomo Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj (ESFF). Dum sia mallonga ekzisto la societo kolektis en siajn vicojn multajn fervojistojn, kaj la agado jam portis bonajn fruktojn. En sia jarkunveno la 27an de marto la societo pritraktos gravajn aferojn, kun la espero, ke jam baldaŭ oni konstatos fortan progreson de la movado en niaj vicoj.

La sekretario A. Ruhanainen.

---

## ESPERANTO-LIGO DE FINNLANDAJ INSTRUISTOJ.

La ligo estas fondita la 21:an de junio 1921. Dum sia tuta ekzisto ĝi restis relative malforta. Komence la membraro konsistis el dudeko da geinstruistoj, sed dum la ses unuaj jaroj la nombro kreskis al 47 kaj restis ĝis la milito super 30. Tiam perdiĝis ĉiuj membroj krom la 15 dumvivaj.

Post la milito la membraro iom post iom se eĉ malrapide kreskis kaj atingis en la jaro 1949 la nombron 62. Sed bedaŭrinde multaj cetere aktivaj membroj ne zorgis pri la pago de sia jarkotizo kaj tial restis ekster la ligo. En la fino de 1950 la nombro de pagintaj membroj estis nur 42, el kiuj 23 estis dumvivaj membroj kai 2 novaliĝintoj. La jaro 1951 komenciĝis esperplene, ĉar ĝis la mezo de februaro aliĝis 6 dumvivaj membroj, unu jarmembro kaj 9 seminarianoj.

Dum la pasinta jaro la ligo aliĝis al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kaj tial ĝi ne povos kiel ĝis nun vivi kvazaŭ kaŝe, sed devos montri sian ekziston al la tuta mondo kaj precipe al la Finnlanda instruistaro. Tial estas grave, ke ĉiuj esperantistaj geinstruistoj en la lando apartenu al sia propra ligo. — Eble kelkaj opinias, ke la aliĝo donas al ili malmultan utilon. Tio povas esti vero, sed memoru, ke **por la ligo** ĉies aliĝo estas grava.

La kotizoj estas tiom malaltaj, ke efektive temas nur pri morala subteno. Ne rifuzu doni ĝin per via aliĝo. La dumviva kotizo estas nur 500 mk, la jarkotizo 50 mk kaj la jarkotizo por seminarianoj nur 10 mk.

Sendu la kotizon al Suomen Opettajain Esperantoliitto, Untamontie 4 D 23, Helsinki—Käpylä, prefere per la poŝta ĝirokonto 12918.

Kaj bonvenon al la jarkunveno la 27:an de marto!

Hannes Koivu.

---

kojn. Estas la devo de ĝuste vi fari vian parton en la komuna laboro. Se vi tion faros, nia komuna esperanta movado forte antaŭenmarŝos kaj pleniĝos la malplena loko en la tutmonda fronto de la esperanto-movado, tiu loko, kiun nur ni povas okupi.

Y. Kuorikoski.

## UEA

Universala Esperanto-Asocio estas konata al ĉiu aktiva esperantisto. Gia laboro estas la fundamento de nia movado. Tial ĉiu esperantisto devus aliĝi al UEA. Kaj tion neniu faros sen plena utilo. UEA kapablas servi al ni ĉiuj. Kaj ju pli multaj aliĝos, des pli forta estos la Asocio. Jam nun ĝia "konsula sistemo" ĉirkaŭbrakas la tutan terglobon: en 60 landoj estas 2000 delegitoj. Ankaŭ en Finnlando estas delegito en 60 komunumoj, kaj krom ili 16 vicdelegitoj kaj 48 fakdelegitoj.

UEA aranĝas ankaŭ nunjare konkurson pri revarbado. Deirante de la stato en la fino de lasta jaro ĉiu lando ricevas 5 poentojn pro MJ membroj, 10 poentojn por MA membroj ktp. En la nuna momento **nia lando okupas la unuan lokon** per 99,3 % revarbado. Super 90 % estas krom tio nur Portugalujo kun 94,2, tri landoj superas 80 %, du superas 70 %, kaj entute 16 landoj transiris 50 %:an limon.

Nun dependas de nia aktiveco, ĉu ni povas konservi tiun lokon. Ĉar ni nun ne povas (pro valuto) pagi ŝubtenantajn kotizojn, mi proponas ke la personoj, kiuj emas subteni, pagu por iu neriĉa junulo la kotizon de MA (aŭ almenaŭ MJ), por tiel varbi konstantajn membrojn al niaj vicoj inter la lernantaro. Ankaŭ vi kompreneble povas pagi kotizon al persono elektota de la ĉefdelegito.

Bedaŭrinde preskaŭ ĉiujare 40—50 malnovaj membroj ne zorgas pri repago de la kotizoj. Bonvolu streĉi viajn fortojn por forigi ĉi tiun gravan domaĝon. La kotizoj ja vere estas malaltaj — nur 6-oblaj kontraŭ la antaŭmilitaj, dum ĉio alia transiris la 10-oblan limon.

La MJ kun kotizo 180 mk ricevas la jarlibron, kiu jam aperis 256-paĝa por 1951, membrokarton kaj signetojn por atesti sian membrecon ĉe servopetoj, kaj aŭtune duan parton, ĉ. 50-paĝan de la jarlibro. MA pagas 420 mk kaj ricevas krom suprenomitaj valutoj monatan bone redaktatan gazeton ESPERANTO. La provnumero estas ricevebla ĉe peto.

Pagu la kotizojn al konto 60253.

Ĉiuj bonvolu ankaŭ helpi por plidensigi la reton de la delegitoj en nia lando. Proponu vin mem kiel delegiton en via loko, aŭ kiel vicdelegiton aŭ fakdelegiton, se la delegito jam ekzistas. Unue tralegu tamen la paĝon 90 en la jarlibro. La taskoj de delegito ne estas tro laborigaj, sed ju pli multaj ili estas, des pli bone servas nia Asocio. Ne lasu senutilan modestecon malhelpi al vi de servado!

Myös esperantoa taitamattomat kansainvälisen kielen aatteen kannattajat otetaan mielihyvin UEA:n jäseniksi. Vuosijäsenen maksu on 180 mk, siihen liitettynä aikakauslehtemme tilaus 420 mk.

Bonvenon al la kunveno la 27:an de marto! Tervetuloa kokoukseen maarianpäivänä!

Joel Vilkki
Somero

---

## 36a Universala Kongreso de Esperanto en München 4—10. 8. 1951.

La kotizon vi povas pagi per mi, sur la poŝta ĝirokonto 60253. La kotizo estas ĝis fino de marto 1250 mk, por geedzo duono, por junulo ne pli ol 20-jara 425 mk.

Joel Vilkki
Somero

---

## MEMORFESTO POR G. J. RAMSTEDT

Esperanto-Instituto de Finnlando aranĝis feston je la memoro de G. J. Ramstedt la 26:an de februaro en la kunvenejo de la artista hejmo de Lallukka en Helsinki. Ĉeestis pli ol 60 personoj, parencoj de GJR, lingvistoj kaj aliaj kulturpersonoj, esperantistoj kaj kontraŭalkoholuloj. La feston malfermis sroj T. Kankkonen kaj L. Saarinen per violona kaj piana dueto. Salutparolis Vilho Setälä parolante pri GJR kiel pioniro esperantista. Mag. Elsa Kostiainen deklamis kaj kantistino Sirkka Lehtivaara kantis per vortoj de GJR, finne kaj esperante. Redaktoro Karpio parolis pri la kontraŭalkohola agado de GJR. Post lego de unu ĉapitro el la verko "Kiel sendito en Nippono" kaj mallonga komento la bele akorda festo finiĝis per "Kanto de Suomi".

# Gravaj verkoj de nia eldonejo:

**Aleksis Kivi: SEP FRATOJ**

**La ĉefverko de finna literaturo**

| | | |
|---|---|---|
| Papere bindita | 370 | mk |
| Kun tola dorso | 430 | mk |

**Vilho Setälä: BURĜONOJ**

Infanoj en poezio kaj fotografio **Bela donaca verko kun tradukoj de plej eminentaj poetoj finnaj**

| | | |
|---|---|---|
| Kun tola bindaĵo | 430 | mk |

**Vilho Setälä kaj Elsi Borg: 1, 2, 3 Peĉjo kaj Anjo kalkulas**

Ĉarma bildolibro por niaj infanoj, kiuj volas lerni la sekretojn de aritmetiko per ludado

| | | |
|---|---|---|
| Kartona kovrilo, tola dorso | 100 | mk |

Atentu la malaltigitajn prezojn pro forigo de la imposto.

Eksterlandanoj povas pagi al ni la verkojn per respondkuponoj, se ili ne trovas ilin en sia esperanta librovendejo. Prezoj afrankitaj: Sep fratoj 24 RK, Burĝonoj 25 RK, 1, 2, 3 = 6 RK

Novaj prezoj de la malmultekostaj eldonaĵoj:

Erkko, Spegulo homarana
Kivi, Lea, La Fianĉiĝo
Linnankoski, Batalo pri la domo
} po 20 mk (afrankite 2 RK)

Kivi, Botistoj
Hertz, Jolanto
} po 40 mk (afrankite 3 RK)

Finnaj Esperantistoj! Ni havas multajn eksterlandajn librojn kaj havigas al vi aliajn laŭ mendo.

ELDONO **VILHO SETÄLÄ**
TAIVASKALLIO
HELSINKI
Ĝiro 6117

Jämsässä 1951. Jämsän Lehden Kirjapaino.

# *Sep fratoj.*

Pro korespondo kun kelkaj samideanoj ni volas reveni al la verko de Aleksis Kivi. Ni trovis en la esperanta traduko kelkajn redakt- kaj preserarojn, el kiuj la lastaj plejparte ekaperis dum la presado, kaj tial ne troviĝas en ĉiuj ekzempleroj. Ilin ni citos en la unua listo.

Kelkaj legantoj deziris pliajn klarigojn — aliaj pretendis, ke la multaj klarigoj malhelpis al ili la legadon. Por la unuaj ni donas sube la duan liston. Al la aliaj ni nur diras: por ne kaŭzi la malhelpon dum la legado, ni metis nenian signon en la tekston pri klarigo en la fino. Tial la klarigoj tute ne estas ĝenaj. Eĉ ne estas necese legi ilin, se oni ne estas speciale studema. Ni pruvas tion per statistiko:

**Klarigoj pri la ĉirkaŭaĵo, tempo, atmosfero:**

| | | |
|---|---|---|
| Medio, kulturo, tekniko tiutempa | 40 | klarigoj |
| Mitologio, etnografio, popolkredo | 23 | „ |
| Historio | 17 | „ |
| Nomoj kun loka koloro: | | |
| Personaj nomoj | 42 | „ |
| Loknomoj (servantaj kelkfoje ankaŭ kiel familiaj nomoj) | 98 | „ |
| Bestoj regionaj | 20 | „ |
| Kreskaĵoj regionaj | 10 | „ |
| Malnovaj mezuroj | 12 | „ |
| Aludoj al literatura fonto (Biblio 115) | 130 | „ |
| Lingvaj klarigoj: | | |
| Vorteraroj (uzitaj pro stilo) | 7 | „ |
| Vortoj mankantaj en PV (speciale finnaj 4) | 14 | „ |
| Citaîoj el sveda kaj rusa lingvoj | 5 | „ |
| Metaforaj esprimoj | 17 | „ |

**Listoj** (unua cifero = paĝo, dua cifero = linio, + de supre, — de malsupre)

**Listo de eraroj.**

| | | |
|---|---|---|
| 18 | —14 | el „ĝis kiam" forigu „kiam" |
| 50 | —12 | fruntotufo pro fruntfasko |
| 76 | +18 | dolorigis |
| 84 | —11 | ni lasis velki |
| | —10 | Ĉiam, kiam |
| 97 | —3 | de kiu li |
| 109 | —8 | la maljunulo |
| 136 | +9 | sian hararon |
| | +11 | fajro |
| | +13 | disfalis fine |
| | +14 | fajreroj |
| | +15 | ĉielo |
| 140 | +8 | noktomezo |
| 169 | —2 | terura |
| 179 | —2 | punu nin |
| 189 | +14 | teruron kreanta |
| 227 | +17 | rigardu |
| 236 | +6 | malordo |
| | +13 | furiozis |
| 244 | +19 | (partizanon oni eble povus anstataŭigi per gerilisto) |
| 272 | +9 | terurantan |
| 301 | —15 | virgulino |
| 334 | —13 | = yj |
| 343 | | transmetu Hälli, Häme, Hämeenlinna, Härkämäki al paĝo 342 inter Ĝojo kaj Hasti |
| 351 | | transmetu Mäkelä al paĝo 350 inter Macoj kaj Maldiligentaj |

**Listo de klarigoj.**


**Adamo:** frako de Adamo = la nuda haŭto (58 s).

**Glumsako,** sako plena de glumoj = grenventumaĵo (177 s).




**Lutreolo**

**Lutreolo,** (Vison lutreola), malgranda rabbesto el la familio de musteloj, kies felo estas malhele ruĝbruna; nur la lipoj kaj mentono estas blankaj. Korpa longeco 30—35 cm, vosto 12—15 cm. Vivas ĉe bordoj de riveroj kaj lagoj, lerta naĝanto kaj submerganto, manĝas fiŝojn, ranojn, kankrojn. Troviĝas en norda kaj meza Eŭropo.



Naso

**Naso,** konusforma korbo el salikaj vergetoj aŭ el vergetoj kaj reto, por kapti fiŝojn.



Numenio

**Numenio** (Numenius), genro de iom grandaj, longbekaj kaj longkruraj stilzbirdoj (vaduloj). En Finnlando du specoj: Granda numenio (N. arquata) 55—64 cm de beko ĝis vosto, kaj malgranda numenio (N. phaeopus), 42—49 cm. Ili transmigras el norda Eŭropo por la vintro al la bordoj de Mediteraneo ĝis Suda Afriko.

**Radiko:** viro el malnova radiko aludas al la konata fakto, ke la radiko estas la plej rezista ligno (119 ma).

**Tataro** estis 'apelativo' por kolportisto, ĉar tataroj estis konataj pro siaj longaj komercaj vojaĝoj (182 m).


# VIZITU

**la internaciajn feriajn Esperanto-kursojn**

en Hälsingör, Danlando la 22—29 de julio.

Sub aŭspicioj de U E A.

Petu prospekton de

**SRO L. FRIIS**

Ingemannsvej 9, Aabyhöj, Danlanlo.


**Verkoj livereblaj.**

Aldona listo (majo 1951).

**Novaĵoj:**

| | |
|---|---|
| Bastien, Naŭlingva Etimologia leksikono, bind. | 500:— |
| Lapenna, Retoriko, bind. | 700:— |
| Sveda Novelaro, bind. | 350:— |
| Heyerdahl, Kontiki | 900:— |
| Nokto, kaksikielinen (esp. ja suomi) | 20:— |

**Libroserioj.**

| | | |
|---|---|---|
| Epoko-libroj: | n:oj 1—6 po | 80:— |
| | 7 kaj 10 | 160:— |
| | 9 | 150:— |

1. Christie, Murdo en orienta ekspreso
2. Molnár, La knaboj de Paŭlo-strato
3. Wodehouse, La princo kaj Betty
4. Wells, La tempo-maŝino kaj Lando de blinduloj
5. Burroughs, Prncino de Marso
6. Merimée, Colomba
7. Aszlányi, Sep vangofrapoj
8. Stuttard, La virineto en bluo
9. Zweig. Brulanta sekreto.
10. Naĵivin, Kiso de reĝino

ELDONO VILHO SETÄLÄ
Taivaskallio.

**ANONCETOJ.**

**35 jara svisa invalido** deziras koresp. kun s-anoj (paralizitoj) el la nordaj landoj pri ĉiuj temoj. Sro J. P. Schaffter, Sur les Crets, **Moutier,** Svislando.

**INSTRUISTOJ — OPETTAJAT!**

Nia poŝtĝirokonto havas la numeron 12918. Pagu viajn kotizojn per ĝi!

Mukavinta on maksaa jäsenmaksunne postisiirtotilillemme n:o 12918.

Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj — Suomen opettajain Esperantoliitto.

Jämsässä 1951. Jämsän Lehden Kirjapaino.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL